



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 5 • Novembro/Decembro 1959

GEFA kunvenis en Dortmund

Ĉi-foje nia jarkunveno, la tria, okazis la 17./18. 10. 1959 en Dortmund, en la urbo de la karbo, de la fandformoj kaj — ĉi-jare ankaŭ de la floroj. Brilis la jam delonge kutima suno, kiam alvenis la unuaj delegitoj, kunvenante al la tuta teritorio de la Germana Federacia Fervojo.

Staris antaŭ ni du celoj: flegi la personajn kontaktojn inter malnovaj kaj novaj amikoj kaj trovi en komunaj diskutoj la bazon por la venontjara laboro. Jam anticipe oni rajtas konstati, ke tiuj celoj estas atingitaj. Precize je la 10a sabate la estraranoj de GEFA prenis siajn sidlokojn en saloneto de hotelo Industrie, en kiu cetero okazis ĉiuj aranĝaĵoj de la tuta jarkunveno, granda agrablaĵo. Jam dum tiuj du horoj fruktodona laboro estis farata, kies efikojn oni rimarkos en la venonta jaro.

Samtempe funkciis la akceptejoj, por kiu la urba trafikoficejo estis disponiginta specialan giĉeton. Tiel la alvenintaj kolegoj vid-al-vide de la ĉefstacio tuj povis ricevi siajn dokumentojn. Krom la programo estis inter ili belega 12 paĝa german- kaj esperantlingva broŝuro kun multaj fotografiaĵoj kaj alia bildprospekto pri Dortmund, migradkarto pri la urba ĉirkaŭaĵo, la varbbroŝureto „Blick in die Stadt“ kun salutvortoj favore al nia kunveno sur paĝo 7 kaj la nova varbfolio de la Germana Federacia Fervojo „Bela kaj komforta“. Krome ne mankis urboplano, ĉiam dankplene akceptata helpilo en nekonata grandurbo. Deko da afiŝoj en la ĉefstacio kondukis al la akceptejoj.

Apenaŭ estis finita la estrarkunveno, kiam jam sekvis nova tasko. Estis invititaj ĵurnalistoj kaj fakte venis reprezentantoj de kvin gravaj gazetoj, kiuj dum pli ol unuhora konferenco kun rimarkinda intereso aŭskultis la klarigojn, kiujn donis al ili la kolegoj Rummel, Schnetzer kaj Giessner. Mirigitaj ili estis, vidante la horarŝlosilojn kaj faldfoliojn de la fervojo. Oni povas esti konvinkita, ke tiuj ĵurnalistoj ricevis profundan impreson

pri la seriozezo de niaj klopodoj. Cetero aperis minimume 11 artikoloj pri nia kunveno, i. a. en „Bild“. Krom la ĵurnalistoj ĉeestis reprezentanto de la fervoja gazetarservo el Essen kaj la sekciestro por kulturaj aferoj de la direkcio Essen.

Dum posttagmeze parto de la kolegoj vizitis la florekspozicion, la distriktaj delegitoj komune kun la estraranoj kunsidis dum 4 horoj, diskutante longan tagordon. Estis ĝojige, ke la subsekcioj montris grandan intereson por la problemoj de nia faka movado kaj konstrue kontribuis al la sukcesa rezultato de la kunveno. Bedaŭrinde estis, ke mankis la reprezentantoj de la distriktoj Köln, München kaj Stuttgart, el kiuj nur München senkulpigis sin.

La samtempa vizito en la florekspozicio donis impreson neforgeseblan al la ravitaj okuloj. Dank' al la belega vetero ne nur miloj da multkoloraj rozoj kaj mirige belaj asteroj kaj dalioj, sed ankaŭ multnombraj bedoj de aliaj florspecoj ĝojigis la okulojn. Kaj certe neniu forgesos la „Dancantajn Fontanojn“, kiuj, brilantaj en ĉiuj koloroj de la farbaskalo, laŭritme akompanis melodiojn de konata valso. En speciala ekspozicio ĝuemuoj povis admiri grandiozajn kolektojn de premiitaj pomoj, piroj, legomoj kaj plej belaj floroj ĉiuj-specaj.

Venis la vespero kun la „Esperanto-solenaĵo“. Bedaŭrinde el la granda rondo de pli ol cent fervojistaj esperantistoj de Dortmund laŭ nia scio nur ĉeestis tri, el la diversaj Esperanto-societoj de la urbo proksimume dekdu. Oni ne esploru, kiu aŭ kio kulpas pro tio, sed estas hontinde, kiam esperantistoj tiom evidente mal-estimas, se ne bojkotas longe preparitan kaj diskonigitan aranĝaĵon seriozan. Kvankam do la tre granda salono nur duone estis okupita, la kunvenintoj tamen travivis solenan horon, kies centra punkto estis la riĉenhava, intereseza prelego de Rudolf Seebacher pri la temo: „Dr. Zamenhof

kaj Esperanto“. Eĉ inter la esperantistoj aŭskultantaj la plej malmultaj jam sciis ĉion, kion la oratoro elokvente prezentis al ili.

Ĉeestis inter alie fervoja konsilisto Schmidt de la direkcio Essen, kiu reprezentis la dejore malhelpitan prezidanton de la direkcio same kiel la decercentojn por personaro kaj por socialaj aferoj. Li tre afable salutis la kunvenon. La ĉefestraron de la Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo reprezentis nia konata amiko kaj favorulo Rummel el Frankfurt/Main. Plie ĉeestis s-ro Ulitz, Essen, estro por kulturaj aferoj en la distrikto Essen kaj s-ro Wagner, estro por kulturaj aferoj en Dortmund, kiu samtempe anstataŭis la estron de la funkcioficejo Dortmund. Precipe al tiuj du kolegoj ni ĉi-loke dankas pro ilia daŭra helpemeco kaj aktiveco en la preparado de nia jarkunveno. Krome estis reprezentataj la Sociala Organizo de la regiono Dortmund flanke de s-ro Pargmann, la sindikato de la fervojaj oficistoj (GdBA) flanke de s-ro Westerwelle, la Instituto por eksterlandaj aferoj en Dortmund flanke de s-roj Steinberg kaj Seebacher. La invitita reprezentanto de UEA, s-ro Rosenträger, ne povis veni kaj sendis salutojn. Speciala ĝojo estis, ke ni povis bonvenigi en nia rondo reprezentantinon de niaj francaj kolegoj, f-inon Estrade, Parizo, kaj nian estimatan amikon, la prezidanton de la aŭstria sekcio de IFEF, s-rondiplomiĝ. F. Tschom el Linz. Ambaŭ transdonis salutojn de siaj asocioj. Pro diversaj kaŭzoj ne povis veni estrarano de IFEF, sed post siaj bonvenaj vortoj la prezidanto de GEFA, kol. Giessner, Elze/Han., laŭtlegis la salutleteron de la IFEF-estraro, el kiu jen sekvas ekstrakto:

„... Spirite kaj pense ni tamen estas en la rondo de nia plej granda kaj plej aktiva sekcio, kies laboro kaj agoj puŝis nian movadon fervojistan tiom forte antaŭen. Estas por mi eksterordinara plezuro, nome de la ĉefestraro de IFEF tulkore saluti vin en tiu ĉi kunveneco, krome danki vin pro la tre aktiva partopreno en nia komuna tasko, disvastigi nian lingvon inter la samfakuloj... La eminenta gvidado, la harmonia kunlaborado kaj la individua entuziasmo en GEFA estas ĉiuj altvaloraj ekzemploj por ni... Por tre gravaj postenoj en nia internacia movado GEFA liveras la plej taŭgajn fortojn kaj iniciatis la filmprezentadon kaj la fabrikadon de gramofondiskoj. Ke la diskutoj en via tria jarkunveno ankaŭ estu konformaj al la famo pri la konstrua laboro en GEFA, la ĉefestraro de IFEF deziras al via jarkunveno la plej brilan sukceson.

Nome de la IFEF - ĉefestraro, la sekretario Jan Lok.“

Nia raporto restus nekompleta, se oni ne menciis la eksterordinare brilan prezentadon de la Salzburga Sinfonio D-majora de W. A. Mozart flanke de membroj de la Fervoja Sinfonia Orkestro Essen sub gvidado de Oswald Lorich.

Post tiu ĉi solenaĵo la plej multaj restis, por pasigi ankoraŭ kelkajn horojn en amika rondo. Gojigis nin nun la BSW-orkestro Dortmund kaj eĉ instigis kelkajn dancemulojn, kiuj favore eluzis la abundan spacon de la salono. Alternis prezento de poemoj kaj kantoj kun babilado kaj dancado, tiel ke noktmezo multe tro rapide alproksimiĝis.

La dimanĉa antaŭtagmezo denove kunvenigis ĉiujn gekolegojn en la „Plena Jarkunveno“. Laŭdon al la edzinoj, kiuj estis videblaj en la kunveneco. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la loka SAT-societo. Kol. Giessner laŭtlegis la jarraporton pri la tempo inter la dua kaj tria jarkunvenoj (komp. ekstrakon ĉi-sube). Poste li donis klarigojn pri lingvaj ekzamenoj kaj anoncis, ke en la GEFA-Bulteno estos skribata pri tio. La subsekcio de la distrikto Saarbrücken, kol. Winkelhaus, invitis la 4an jarkunvenon al Trier. Ĝi antaŭvideble okazos la 15./16. 10. 1960. La ĉeestantoj volonte akklamis tiun inviton. Nia aŭstria amiko Tschom donis diversajn tre interesajn sciindaĵojn pri la aŭstria landa asocio. I. a. li menciis, ke ĉe kol. Bürger en Linz oni povas pruntepreni diapozitivojn kun akompana sonbenda prelego unuhora pri la Universala Kongreso en Varsovio (ni rekomendas ĝin). Li invitis al la jarkunveno de la aŭstria sekcio la 10. 4. 1960 en Linz, same kiel f-ino Estrade invitis al la franca jarkunveno la 13. 12. 1959 en Parizo.

La kolegoj en la distrikto Hannover pretigis migran Esperanto-ekspozicion, kiu estas luebla ĉe s-ro Heimlich, Bm Soltau (Han.), Basa 949/850/127. Ĝi estas vere rekomendinda por plivalorigi varbukunvenojn. Precipe ĝi taŭgas, por doni klarigojn al nesperantistoj.

La GEFA-estraro intencas kompili aron da diapozitivaj, kiuj poste kune kun sonbendo servos kiel varbprelego antaŭ nesperantistoj. Kol. Giessner prezentis kolekton de materialo, el kiu parto povos esti uzata. Ĉi-okaze ni dankas al la fervojista foto-societo Dortmund pro ĝia amika helpo. Sekvis vigla diskuto. Kol. Ritthaler gvidos tiun aferon (adreso: Bf. Deidesheim, Basa 954/832/4222). Kiu havas taŭgajn diapozitivojn, bv. tamen sendi ilin unue al kol. Giessner, Bahnhof Elze/Han.

Pro troa laboro la estraro urĝe serĉas kunlaborantojn, kiuj libervole transprenos definitivajn taskojn, **ne por ĉiam**, sed laŭ la cirkonstancoj momentaj, kiel montrās la ekzemplo de kol. Ritthaler ĉi-supre. Ni petas komplezajn kolegojn, anonci sin ĉe la sekretariino.

Fine la prezidanto dankis al tiuj kolegoj el la fervojista grupo Dortmund, kiuj pro siaj bonvolo kaj aktiveco ebligis la aranĝon de la jarkunveno. Li same dankis al la subsekcio de la distrikto Essen, kol. Schnetzer el Soest. Precize je la 12.30 h la prezidanto fermis la jarkunvenon, esprimante la deziron, ke multe pli da kolegoj venos venontjare al Trier, al la belega, vidinda urbo ĉe rivero Mozelo.

Giessner

La Jarkunveno pasis.

JARRAPORTO (mallongigita)

Jarkunveno estas kiel naskiĝtago. Oni staras antaŭ nova jaro kaj ĉiufoje ŝajnas, kvazaŭ la venonta jaro estus longa, sufiĉe longa por plenumi ĉiujn taskojn necesajn. Sed post la jaro denove venas naskiĝtago. Kaj nun repensante oni ekkonas, ke tamen ne estis ebla fari ĉion, kion oni estus povinta aŭ devinta fari.

Mi raportu pri la farita parto de niaj taskoj, por ke ni havu superrigardon pri la bazo, el de kiu ni eklaboros en la venonta jaro. Lastan jaron en Nürnberg mi donis resumon pri la pasintaj 10 jaroj, la unua jardeko de nia faka movado en Germanio post la milito. Ni vidis, ke el nenio GEFA estas rekonstruita post la milito, kaj ni rajtas diri, ke ĝi estas multe pli impone rekonstruita ol ĝi iam aspektis en antaŭaj tempoj.

Hazarde en ĉi tiu jaro esperantlingva mondkongreso okazis en Germanio, eĉ en la sama urbo, kie ni troviĝas hodiaŭ, nome la kongreso de SAT. Niaj senlaciaj kolegoj en Dortmund kaptis la okazon, kaj denove la anoj de GEFA en komisio de la Germana Federacia Fervojo pruvis la taŭgecon de nia lingvo por la internacia trafiko. Ili zorgis por niaj eksterlandaj samideanoj dum la tuta kongressemajno, tiamaniere denove substrekante la bonegan impreson el la antaŭaj jaro.

Post la jarkunveno en Nürnberg ni ne dormadis, sed daŭrigis niajn klopodojn. Mi menciuj kelkajn detalojn, unue pri organizaj problemoj ĝenerale interesaj. La ŝtupoj de nia fakorganizaĵo estas al vi konataj: konsila fakkomitato ĉe la ĉefestraro de BSW, subsekcioj ĉe la distriktestroj de BSW kaj la plej grava ŝtupo, kiu nur ebligas la vivon de la organizo, la lokaj grupoj kun siaj membroj. El demandoj, senditaj al la subsekcioj komence de la jaro, evidentiĝis, ke la subsekcioj parte favore evoluas,

parte stagnas. Regreso ne estis ekkonebla, sed jam stagnado estas regreso. Ni tute ne povas kaj volas toleri regreson. Pro tio en kelkaj distriktoj ni serĉis kaj trovis kolegojn, kiuj ne nur laŭnome, sed ankaŭ laŭfakte prenis sur siajn ŝultrojn la taskon de la distriktgvidado.

Estas ĝojiga fakto, ke multaj grupoj fidele kaj favore laboradas, ke iliaj membronombroj kreskadadas kaj ke ili ĝustasence komprenas la celon de sia ekzistado.

Neniu organizaĵo povas vivi sen mono. Pro tio la pago de la kotizo estas grava kaj tute ne superflua. Ĉi-loke ni denove petas ĉiujn membrojn, akurate pagi la vere modestan kotizon kaj faciligi la tiurilatan ampleksan laboron ĉe subsekcioj kaj sekretariino. Oni pripensu, ke ĉiuj funkcioj libervole donas sian liberan tempon por nia afero.

Sur la tereno de la varbado ni denove estis aktivaj kaj havis la plezuron, ke nia, multkolora faldfolio de la Germana Federacia Fervojo estas eldonita en Esperanto sub la titolo „Bela kaj komforta“. Dum la UK en Varsovio kaj la SAT-kongreso en Dortmund ĝi estas distribuita al la partoprenintoj. Ĝia eldonkvanto estis 20000.

De la giganta tasko, kiun havas la sekretariino, s-ino Kruse kaj la respondeculo por la varbado, s-ro Barnickel, vi eble povas fari al vi imagon, pripensante, ke dum la lastaj jaroj pli ol 25000 ekzempleroj de varbprospektoj iris tra iliaj manoj al samideanoj en ĉiuj direktoj de Eŭropo kaj eĉ de transmaraj landoj kaj ke nun denove multaj miloj atendas forsendon. Sed krom la ekspedado kreskadadas sur iliaj skribtabloj montoj da korespondajoj respondendaj. Mi uzas ĉi tiun okazon, danki al ili en la nomo de nia tuta faka organizaĵo pro

tio, kion ili faradas daŭre, fidinde kaj neviditaj de aliaj homoj.

Plue ni ĝojplene povas sciigi al vi, ke la unuan fojon la reklamo-oficejo de la Germana Federacia Fervojo aperigis tutpaĝan anoncon en la jarlibro de UEA, kiu estas tre belefika, kaj ke en 1960 aperos simila anonco. Planita estas la baldaŭa eldono de varbafiŝoj por la tielnomataj „Nigraj tabuloj“ en niaj deĵorejoj.

Granda sukceso estas la eldono de dukoloraj glumarkoj kun blanka germanlingva teksto „Esperanto, deine zweite Sprache“. Sur ili estas videbla blanka flugila rado kun la verda stelo sur griza ĉefkoloro. Ili estas disdonitaj al ĉiuj subsekcioj kaj povas esti uzataj de ĉiuj GEFA-membroj por deĵoraj poŝtaĵoj. Ili kompreneble same estas uzebaj en Aŭstrio kaj Svisio kaj sekve senditaj ankaŭ al tiuj landaj asocioj. BSW pagis la tutan.

Same ĝojiga estas la fakto, ke la sekretarieto de GEFA nun disponas pri skribmaŝino kun speciala klavaro de Esperantoliteroj. Ĝi estas liverita de la firmo Triumph kaj pagita de BSW laŭ iniciato de nia favora amiko Rummel en la ĉefestraro de BSW.

Ĉiu, kiu kiel fervojisto lernis Esperanton kaj ĉiu kursgvidanto jam spertis la fakton, ke multaj kolegoj forrestis el la kursoj pro deĵoraj kaŭzoj. La ŝanĝdeĵoroj kelkfoje ne permesis viziti la kurson, ili perdis scion kaj kuraĝon. Jen la punkto, kie komenciĝis la ideoj de nia kolego Jäger. Li prilaboris 6 instruleterojn (Beratungsbriefe) kiel kompletigon al la konata lernolibro de Wingen kaj tiamaniere ebligas al personoj, kiuj ne regule povas partopreni kurson, tamen sekvi la instruadon de la kursestro aŭ eĉ tute sola trastudi kaj kompreni la enhavon de la libro.

Detalojn vi povas legi en GEFA-Bulteno n-ro 3/59.

Ĉiu el vi, kiu vizitis la kongreson en Linz, tie povis observi, ke la germana landa asocio estis

inter la plej viglaj kunlaborantoj. Ni ne faris tion, por fanfarone prezenti nin kiel precipe agemaj, sed ĉar ni firme opinias, ke atenta, intensiva kunlaboro en kaj por la kongresoj estas rimedo por progresigi nian fakon movadon. Pro tio ni estis farintaj diversajn kongresproponojn. Kvankam ĉi tiuj proponoj ne ĉiuj estas aprobitaj — tio ja ne nepre estas la celo — ili tamen kaŭzis almenaŭ viglajn diskutojn, kaj precipe la 6a propono, rilatanta la fakajn prelegojn, kondukis al tre kontentiga solvo. Oni starigis specialan, permanentan komitaton, kies tasko estos, zorgi por dignaj, allogaj, altvaloraj prelegoj en niaj kongresoj. Celo estas, ke la fakprelegoj vere vastigu la fakajn sciojn de la kongresanoj kaj ke la prelegoj tiamaniere fariĝos brilaj punktoj de niaj kongresoj. La komitato, kiu estas gvidata de GEFA, serioze klopodados, alproksimiĝi al tiu celo.

Kompreneble la penadoj de la komitato estos vanaj, se ne ankaŭ la membroj mem en siaj fakaj kongresoj montros iom pli da faka intereso ol ĝis nun. Estas hontinde, kiam en Linz ĉe la komenctempo de la fakprelego nur 6 personoj sidis en la salono, dum ĝustatempe ĉiuj ĉeestis, kiam ekzemple temis pri rondveturado tra la urbo.

Nepre menciinda punkto de nia kongreslaboro estis la filmvespero de Esperanto-Filmo-Germanujo, ĉar la kunlaborantoj de tiu filmsocieto preskaŭ nur estas kolegoj de GEFA. Ili laboras laŭ privataj ideoj kaj sen oficialaj komisioj. Sendube EFG povis doni al la kongresanaro belan impreson pri la Universalaj Kongresoj en Mainz kaj Marseille.

Neniam kompleta faka interkompreniĝo inter la fervojistoj estos ebla, ĝis kiam ne ekzistos terminaro. Laŭ la enhavo de la antaŭ kelka tempo eldonita UIC-vortaro la IFEF-terminaro enhavas la samajn esprimojn. (UIC estas la internacia unuigo de la eŭropaj fervojoj). Oni apenaŭ povas imagi la lacigan amplekson de tiu laboro, kaj oni nur povas

espero, ke la energio de la komitatanoj daŭros ĝis bona fino.

Mi ne forgesu unu fakton, kiu ne jam sufiĉe estas konatigita, kvankam ĝi meritas tion. Tio estas la lasta evoluo de nia GEFA-Bulteno. Ĝis fino de la jaro 1958 ĝi aperis 6foje en la jaro kun entute 24 paĝoj. Ek de ĉi tiu jaro la ĉefestraro de BSW konsentis, aperigi ĝin kun entute 32 paĝoj. Tio signifas, ke ni nun havas la eblecon, precipe en la numeroj antaŭ kaj post la kongresoj resp. jarkunvenoj pli detale raportiti pri tiuj plej gravaj aranĝaĵoj de nia fakmovado. La Bulteno nun aperas po en la fino de la monatoj februaro, aprilo, junio, septembro kaj novembro. Ni ĉi-rilate tre dankas al la grandanimeco de niaj amikoj en la Sociala Organizo.

Nun ni venas el la pasinteco, el la farita laboro, al la estonteco, al la farota laboro.

La GEFA-estraro ĝis nun ĉiam evitis, starigi longajn programojn. Nia laborado dependas de multaj hazardaj cirkonstancoj kaj de homoj, kies intencojn kaj agojn ni plej ofte ne povas antaŭvidi. Multfoje evidentigis, ke adaptado al la situacio estis la plej efika agadmaniero, kaj vi povas esti certaj, ke ni eluzis kaj eluzos ĉiun taŭgan okazon. Ni do ankaŭ hodiaŭ preferas, nur promesi, ke ni faros nian plej bonan. Kaj en la 4a jarkunveno vi povos aŭdi, kion ni faris.

Sed fine permesu ankoraŭ rimarkigon: Ĝis nun mi daŭre

uzis la vorton „ni“, komprenante sub tio la estraron de GEFA. Jam komence mi akcentis, ke la lokaj grupoj estas la plej grava parto de nia organizo. Kaj sen ilia laboro, sen iliaj ideoj kaj sukcesoj kaj sen la helpo de la subsekcioj estroj ankaŭ ni, la estraro, nenion valoras. Ĉiuj ambaŭflankaj klopodoj estas vanaj, se ne fluadas kvazaŭa sanga kurento tra la nevideblaj vejnoj inter membraro kaj estraro. Kaj krome ja ekzistas eĉ tre videbla ligilo, nome la Bulteno. Ĝi estas zorgeme redaktata kaj kaŭzas multe da penado al redakcio kaj kunlaborantoj, same kiel multe da kostoj al BSW. Pro tio mi petas vin, ne jetu ĝin en iun angulon, sed atente legu kaj eluzu ĝin por via poresperanta agado. Ni ĉiuj estu fieraj pro tio, ke ni rajtas esti pioniroj por nia faka movado post tia terura milita tempo, kiu preskaŭ estingis la modestan flamon de la antaŭaj jaroj. Ni, nur ni respondecas por la maniero, laŭ kiu la flamo denove brulas kaj kreskos, ĝis kiam ĝi fariĝos fajro, kiu donos sian varmecon al la koroj de ĉiuj homoj. Ne pli forte ni povas honori la memoron al la estimata kreinto de nia komuna lingvo, ol se ni senbrute tute modeste, sed des pli insiste, des pli firme, des pli obstine iradas rekte antaŭen por la disvastigo de nia lingvo. Ni ne faru vortojn, ni prezentu fortojn kaj farojn kaj faktojn. Laŭ tiu senco ek al la aŭtuna kaj vintra laboro!

Giessner

Jahresversammlung in DORTMUND

(gekürzter Bericht)

Am 17./18. 10. 1959 hielt die „Vereinigung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten“ (Germana Esperanta Fervojista Asocio = GEFA) ihre 3. Jahresversamm-

lung in Dortmund im Hotel Industrie ab. Ziele waren: Pflege der persönlichen Kontakte und Festlegung der Arbeitsrichtlinien für das kommende Geschäftsjahr.

Gegenüber dem Hauptbahnhof im Stadt. Verkehrsverein war das Empfangsbüro untergebracht, wo die ankommenden Kollegen u. a. eine prächtige bebilderte Broschüre über Dortmund in Deutsch und Esperanto erhielten. Die wöchentlich erscheinende Schrift „Dortmund, Blick in die Stadt“ brachte auf Seite 7 freundliche Grußworte. Gleichfalls verteilt wurde die neue Werbeschrift der DB „Bela kaj komforta“ d. i. „Schön und bequem“. Im Hauptbahnhof waren eine Reihe esperantosprachige Aushänge angebracht, die zum Empfangsbüro wiesen.

Bereits am Sonnabendvormittag wurde eine zweistündige Vorstandssitzung durchgeführt, deren Ergebnisse sehr ersprießlich waren. Anschließend fand ein Presseempfang statt, zu dem eine ganze Reihe Vertreter großer Zeitungen des Dortmunder Gebietes und der Deutschen Presse-Agentur erschienen. Sehr interessiert hörten die Damen und Herren den Erklärungen zu, die ihnen die Kollegen Rummel, Schnetzer und Giessner gaben. Sichtlich überrascht waren sie, als sie die esperantosprachigen Kursbuchschlüssel und Werbeblätter der DB sahen. Anwesend waren auch der Pressedienst und der Abteilungsleiter für die Kulturelle Betreuung der BD Essen.

Der Nachmittag wurde von dem größten Teil der Anwesenden für einen Besuch der Bundesgartenschau ausgenutzt. Währenddessen kamen der Vorstand und die Unterabteilungsleiter der Direktionsbezirke in einer vierstündigen Sitzung zusammen, wobei in lebhaften Diskussionen die Arbeit für das kommende Jahr besprochen wurde.

Am Abend fanden sich sämtliche Teilnehmer zu einer Esperanto-Feier zusammen, in deren Mittelpunkt ein lehrreicher Vortrag von Herrn R. Seebacher stand über das Thema „Esperanto und Dr. Zamenhof“. Damit stand diese Feier gleichzeitig im Zeichen des Gedenkens an den

Schöpfer der Internationalen Sprache, der 1859 geboren worden ist. U. a. waren anwesend BR Schmidt, Essen, der den dienstlich verhinderten Herrn Präsidenten der BD Essen vertrat, sowie auch die Herren Dezernenten 3 und 5. Der Hauptvorstand des Sozialwerkes der DB wurde durch Herrn Rummel, Frankfurt/Main, vertreten. Weiter waren anwesend der Abt.-Leiter für die kult. Betreuung bei der BD Essen, Herr Ulitz, und der Leiter für die kult. Betreuung in Groß-Dortmund, Herr Wagner. Beiden sei besonders gedankt für ihre lebenswürdige Unterstützung bei den Vorarbeiten. Weiter waren vertreten die BSW-Ortsstelle und das BA Dortmund, die Gewerkschaft Deutscher Bundesbahnbeamten und Anwärter, das Auslandsinstitut Dortmund und die SAT-Gruppe. Der UEA-Delegierte hatte Grüße übermittelt. Eine Vertreterin der französischen Eisenbahner-Esperantisten, Fr. Estrade, Paris, und der Präsident der österreichischen Eisenbahner-Esperantisten, Diplom-Ingenieur Tschom, Linz, überbrachten die besten Wünsche ihrer Organisationen für gutes Gelingen der Tagung. Der Vorsitzende der GEFA, Kol. Giessner, Elze/Han., verlas die Grußworte des Vorstandes des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes in Amsterdam, in denen es u. a. hieß:

„... aber in Gedanken sind wir im Kreise unseres größten und aktivsten Landesverbandes... Es ist mir eine besondere Freude, Ihnen für die so lebhaftige Beteiligung an unserer gemeinsamen Aufgabe zu danken, nämlich unsere Sprache unter den Eisenbahnern zu verbreiten... die hervorragende Führung, die angenehme Zusammenarbeit und der persönliche Enthusiasmus in GEFA sind vorbildliche Beispiele für uns... für sehr wichtige Posten in unserer internationalen Bewegung liefert GEFA hervorragende Kräfte und regte die Herstellung von espe-

rantosprachigen Filmen und Grammophonplatten an... für den IFEF-Vorstand, der Sekretär Jan Lok.“

Unser Bericht wäre unvollständig, wenn wir nicht die außerordentlich wirkungsvolle Wiedergabe der „Salzburger Sinfonie“ von W. A. Mozart durch Mitglieder des Bundesbahn-Sinfonieorchesters Essen unter Leitung von Oswald Lorch erwähnten.

Nach dieser Feier blieben die meisten zusammen, um noch einige Stunden in Freundesrunde zu verbringen. Nunnmehr erfreute uns das BSW-Orchester Groß-Dortmund. Es wechselten Gedicht- und Liedervorträge mit Unterhaltung und Tanz, so daß Mitternacht viel zu schnell herankam.

Am Sonntagvormittag fand die eigentliche Jahreshauptversammlung statt. Kol. Giessner verlas den Jahresbericht und gab Aufklärung über die Bedingungen der Sprachprüfungen des Deutschen Esperanto-Institutes. Der Unterabteilungsleiter des BD-Bezirks Saarbrücken, Kol. Winkelhaus, lud die 4. Jahresversammlung nach Trier ein.

Die Kollegen des Bezirks Hannover haben eine Esperanto-Wanderausstellung fertiggestellt, die bei Kol. Heimlich, Bm Soltau/Han., Basa 949/850/127 ausgiehen werden kann. Sie eignet sich besonders zur Aufklärung für Nichtesperantisten.

Der GEFA-Vorstand beabsichtigt, eine Diareihe verbunden mit einem Tonbandvortrag für die Werbung von Nichtesperantisten zusammenzustellen. Kol. Giessner führte das bisher vorhandene Material vor. An dieser Stelle herzlichen Dank für die Hilfe der Fotogruppe des BSW in Dortmund.

Mit Dankesworten an diejenigen Dortmunder Kollegen, die das Gelingen der Jahresversammlung ermöglicht haben, und an den Unterabteilungsleiter des Bezirks Essen, Bamtm Schnetzer, Soest, schloß der Vorsitzende die Versammlung.

Auszug aus dem Jahresbericht,

verlesen auf der 3. Jahresversammlung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten in Dortmund.

1. Zufälligerweise wurde in diesem Jahre wieder ein Esperanto-Weltkongreß in Deutschland abgehalten, nämlich der Kongreß des „Übernationalen Esperanto-Bundes (SAT)“ in Dortmund im Sommer. Unsere nimmermüden Kollegen in Dortmund erfaßten die Gelegenheit, und von neuem bewiesen Angehörige von GEFA im Auftrage der Deutschen Bundesbahn die Brauchbarkeit unserer Sprache für den internationalen Verkehr. Sie sorgten während der ganzen Kongreßwoche für ihre internationalen Gäste aus allen Teilen Europas, so wie es schon im Vorjahre in Mainz geschehen war.

2. Auf dem Gebiete der Werbung waren wir von neuem aktiv und konnten erfreut feststellen, daß das Werbeamt Frankfurt einen neuen farbigen Prospekt in Esperanto für die Deutsche Bundesbahn herausgegeben hat unter dem Titel „Bela kaj komforta (Schön und bequem)“. Während der Weltkongresse in Warschau und Dortmund wurde er verteilt. Seine Auflage beträgt 20000.

3. Das Werbeamt der DB hat im Jahrbuch des Esperanto-Weltbundes im Jahre 1959 erstmals eine ganzseitige Anzeige veröffentlicht, die sehr wirkungsvoll ist und große Beachtung gefunden hat. 1960 wird eine ähnliche folgen.

4. Ein großer Erfolg ist die Ausgabe von zweifarbigen Briefverschlusssmarken mit dem weißen deutschsprachigen Text „Espe-

ranto, Deine zweite Sprache“. Auf ihnen ist das weiße Flügelrad mit dem grünen Esperanto-Stern auf grauem Grunde zu sehen. Sie können von allen GEFA-Mitgliedern als Verschlusssmarken für ihre Dienstpost verwendet werden. Sie sind auch an österreichische und schweizer Kollegen abgegeben worden.

5. Das Sekretariat von GEFA verfügt nunmehr über eine Triumph-Schreibmaschine, die eine nach unseren Angaben hergestellte besondere Tastatur mit sämtlichen Esperanto-Buchstaben besitzt.

6. Kollege Jäger, Frankfurt, hat 6 Beratungsbriefe als Ergänzung zu dem bekannten Lehrbuch „Wir lernen Esperanto“ von Wingen bearbeitet. Die Briefschule des Deutschen Gewerkschaftsbundes gibt diese Briefe heraus. Näheres s. GEFA-Bulteno Nr. 3/59.

7. Im internationalen Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten in Linz/Donau ist ein Arbeitsausschuß unter deutscher Führung gebildet worden, der für die Durchführung hochwertiger Fachvorträge in den internationalen Kongressen zu sorgen hat.

8. In Linz wurde weiter ein neues Bundesabzeichen angenommen, das der österreichische Landesverband entwickelt und vorgeschlagen hatte (vgl. GEFA-Bulteno Nr. 3/59).

9. Ebenfalls in Linz stellte sich heraus, daß wahrscheinlich im kommenden Jahre einige Eisenbahnverwaltungen dem Beispiel der DB folgen werden und Esperanto im Kursbuch einführen werden. Unterdessen hat die polnische Bahn dies bereits getan.

10. In Linz hat die aus deutschen Eisenbahnern bestehende Arbeitsgemeinschaft „Esperanto — Filmo — Germanujo“ einen besonderen Filmabend gestaltet, wobei sie mit mehreren Dokumentarfilmen den Anwesenden einen lebhaften Eindruck von den Weltkongressen in Mainz und Marseille vermittelte.

11. Ein weiterer Ausschuß arbeitet ebenfalls unter deutscher Führung am Aufbau eines Eisenbahn-Fachwörterbuches, das im Inhalt dem bekannten Wörterbuch des Internationalen Eisenbahn-Verbandes (UIC) angeglichen sein wird.

12. Das GEFA-Bulteno erscheint seit dem 1. 1. 1959 nicht mehr 6 mal jährlich mit insgesamt 24 Seiten, sondern 5 mal jährlich mit insgesamt 32 Seiten. Somit steht vor und nach dem internationalen Kongreß und der Jahresversammlung mehr Raum für Berichte und Bekanntmachungen zur Verfügung als früher. Die Erscheinungstermine sind je das Ende der Monate Februar, April, Juni, September und November.

La Junularo Esperantista Brita

aranĝas specialan „Zamenhofan Renkontigon“ en Londono de la 11a ĝis la 15a de decembro 1959.

Jen la ora ŝanco por ĉiu juna esperantisto vidi Londonon dum la antaŭkristnaska tempo. Venu al Londono, la ĉefurbo de la mondo. Renkontu la anglajn esperantistojn. Festu la centjaran datrevenon de nia majstro Zamenhof. Neniām denove vi estos benitaj per tiu-ĉi bonŝanco. Neniām denove vi povos havi tiom da indaj aferoj okazantaj samtempe. Venu kaj festu kun ni.

Pli detalajn informojn oni povas ricevi de la Sekretario:

S-ro H. R. Tonkin
St. John's College
Cambridge
Anglujo

Ĉiam kaj ĉie
portu la verdan
stelon!

PRI LA 44A UE-KONGRESO EN VARSOVIO

Kiam malfruvespere la rapid-trajno Berlino-Varsovio veturis sur la Oder-ponto, multnombraj lumŝetiloj donis al la nuntempa limriverego fantoman aspekton. La vagonaro de la Polaj Ŝtatefervojoj ne estis tro luksa, sed mi estis trovinta sidlokon, kio ŝajnis necerta en la elirstacidomo Berlino, ĉar granda amaso atendis la internacian trajnon.

Multege — ne tro ofte dum tiu sunriĉa somero — pluvis kiam la trajno alvenis la skvan matenon. La celo de dumnokta veturado estis atingata: Varsovio, post la dua mondmilito la unua urbo malantaŭ la „fera kurteno“, kiu servis al la Universala Esperanto-Asocio kiel kongresurbo en 1959. Ĉie brilis la verda stelo, ĉu sur la dulingvaj salutafiŝoj de la urbo, ĉu sur montriloj kaj flagoj, kiuj en longaj vicoj antaŭ la kongresejo reprezentis la internaciecon de la partoprenantaj kongresanoj.

Preterpasante nekompletajn domojn, ruinojn kaj duonkonstruitajn stratojn veturigis la alvenintojn specialaj omnibusoj al iliaj hoteloj kaj min kun multaj aliaj al la ampleksa studenta domo. Tie atendis min vico da formalajoj, antaŭ ol mi havis mian ĉambron.

La urbo estis disponiginta sian plej grandan kaj imponan turdomogon, la „palacon de kulturo kaj scienco“. Laŭdire ĝi staras sur la plej granda placo de l'Europo. Pluraj teatroj, muzeoj, restoracioj, sennombraj oficejoj, universitataj salonoj kaj eĉ naĝejo troviĝas interne de ĝiaj klasicisme aspektaj muroj.

Tie oni kunvenis la unuan vesperon senĝene por interkonatigi kiel kutime. Por multaj novbakitaj gesamideanoj estis la unua okazo trovi kontakton kun alilandanoj. Eble mankis al

tiu vespero la intimeco de niaj IFEF-kongresoj, sed la elegantaj salonoj ne kaŭzis la impreson, ke oni estis nur atomo inter amaso.

Pli ol 3000 kongresanoj partoprenis la malfermon solenan en la giganta, luksa teatro. Sur la scenejo, kie poste okazis teatraĵoj, antaŭ la konata flagego kun la verda stelo, oni vidis eminentulojn de la pola registaro kaj el eksterlando, la estraron de UEA, la reprezentantojn de pli ol 40 nacioj kaj la LKK. Post emocia muziko ludita de la simfoniorkestro Radio Varsovio sekvis multnombraj salutvortoj kaj la festparolado forte aplaŭditaj. Evidente okupis ĉiujn io el la interna ideo, kiam aŭdiĝis la Esperanto-himno.

Dimanĉon posttagmezo la religiaj kunvenoj alogis multajn centojn, katolikojn, protestantojn, budistojn ktp. Nin fervojistojn precipe interesis la fakkunveno, kiu bedaŭrinde ne okazis en la kadro de la oficiala programo, kiel entute mankis oficiala partopreno de la fervojo en formo de fervoja informejo. En la trafikministerio salutis s-ano Nawrowski la relative grandan kolegaron. La kunveno servis precipe al interkontakto kaj intersanĝoj de sperto. Niaj prospektoj kaj glumarkoj trovis grandan intereson, sed la plej evidenta surprizo estis la unufoje aperinta esperantlingva teksto en la pola horaro. Konsiderante la junecon de la pola IFEF-filio oni vere devas gratuli al tiel impona sukceso, des pli multe, ĉar ankaŭ la vintra eldono de la horaro lasas esperi, ke temis ne nur pri unufoja gesto okaze de la kongreso. La interesa fakprelego prezentita de kolego Nawrowski traktis la evoluon de la fervojo.

Preskaŭ ĉiu vespero ofertis

apartan programon, ĉu la famkonatan teatraĵon „Pigmalion“ de Shaw, bonege prezentita de ĉeĥa trupo, ĉu bulgarajn folklor-dancojn en kolorriĉaj kostumoj, ĉu la amuzan komedion „Ĉasantoj de postenoj“. Eĉ Molière estis reprezentata. La baleda trupo el Danzigo montris kiel alogan spektaklon lerte dancitan edziĝfeston.

Alian vesperon renkontis proksimume 3000 personoj en la internacia balo. La ekcigitaj melodioj instigis multajn precipe junajn gekongresanojn sekvi la modernajn dancmelodiojn. Ne kontentige funkciis la havigo de trinkajoj. Ili estis dum tiu varmega sezono ne malvarmigitaĵoj kaj pro tio nur fluaĵoj. Kulmino el la komunaj aranĝoj en tiu kadro estis sendube la oficiala akcepto flanke de la registaro. Ĉiu kongresano estis invitata per speciala dulingva presajo. Dume la vicministro trovis afablajn salutvortojn por siaj multnombraj gastoj kaj la filmaparatoj zumis, niaj okuloj migris al sennombraj gladoj plenaj de alkoholaĵoj, pladoj kun viando ĉiuspecaj, glaciaĵo, kafo kaj cigaredoj.

La publika intereso pri la UE-kongreso estis evidenta. Ĝi fariĝis nur duranga, kiam la vicministro de Usono faris oficialan viziton al Varsovio. Multaj homoj partoprenis la emocian malkovron de memortabulo sur nova domo, kie antaŭe staris la loĝdomo de Zamenhof. La strato cetere jam portas lian nomon. Neforgesebla restas la komuna irado tra la rekonstruita juda kvartalo al la inunde ornamita tombo de Zamenhof en la hebrea tombejo.

Ĉu paroli pri la diversaj ekskursoj? La plej impona okazis pertrajne al Bialistoko, kie la esperantistoj i. a. la UEA-estraro honoris la naskiĝlokon de Zamenhof. . . La dua per

omnibusoj kondukis okcidenten al la naskiĝloko de Chopin, kaj la tria veturigis multajn kongresanojn, ankaŭ min, al la kampara urbo Lowicz, kie fama folkloro danctrupo rikoltis fortan aplaŭdon por siaj prezentadoj.

Ne estas ĉi tie la spaco por raportoj pri la multnombraj kontaktoj, pri la vidindaĵoj de la ĉefurbo Varsovio, kies malnova kvartalo estas rekonstruita kun modela kaj admirinda kapableco, pri la impona ekspozicio, pri la junulara aŭ la infana kongreso,

pri la idiliaj — laŭ mia opinio — trankvilaj stratoj, pri la ĝentileco al ni eksterlandanoj. Post la malfermo okazinta lastfoje en la palaco, venis la adiaŭo kaj baldaŭ rec forveturis la trajno al okcidento. La kofro estis plena da kongrespaperoj, el kiuj elstaris la voluma bildlibro Varsovio. Demandante min, ĉu valoris la peno fari tion neordinaran vojaĝon mi devas konfesi, ke mi estas kontenta kaj dankplena al niaj gastigantoj.

W. Barnickel

Post⁴ kun la administra kunveno kaj raportoj de la grupoj kaj decidoj pri la vintra laboro.

Vespere je la 18a kaj duono aŭskultis la aŭskultintaro la varbparoladon de ekssuperstuddirektoro Schoen, prezidanto de GEA. Li certe konvinkis ĉiujn ĉeestintojn pri la neceso de mondlingvo kaj la taŭgeco de Esperanto. S-ro Wingen, la aŭtoro de niaj konataj lernolibroj parolis pri la neceso, enkonduki Esperanton en la lernejoj. Li ankaŭ rikoltis fortan kaj sinceran aplaŭdon.

La sekvanta konatiĝvespero kun humorajoj kaj dancado kunigis la partoprenintaro dum kelkaj horoj al intima kaj harmonia rondo.

Dimanĉon je la 10a s-ro Berger, redaktanto de la Esperanto-Revuo, faris la festparoladon pri d-ro Zamenhof. Li desegnis kortuŝan bildon pri Zamenhof kiel homo kaj granda amiko de la homaro.

Samtempe ĉiuj interesuloj havis la eblecon viziti la zorge kaj kun amo aranĝitan ekspozicion. Ĝi klare montris la multflankan uzeblecon de nia kara lingvo. La materialo de la ekspozicio estas plej grandparte disponigita de la grupo Wuppertal.

La invititaj lokaj ĵurnalistoj kaj fotoraportisto montris grandan intereson. Redaktoro promesis tuj ekstudati.

La kulmino de la posttagmezo estis la bonega varbparolado de rektoro Pikkard el Wuppertal. Ĉiuj skeptikemuloj kaj dubuloj estis malarmitaj. La sekvanta diskutado montris la grandan intereson. Espereble ni ankaŭ nun povas rikolti la fruktojn. Oni decidis fondi Esperanto-grupon.

La nova kurso por komencantoj komenciĝos la 20an de oktobro en la AW Opladen.

Dum la aŭtuno ankaŭ komenciĝos kursoj en Dieringhausen, Düsseldorf kaj Schwerte/Ruhr. La nombro de la anoncintoj sufiĉas. Fidelaj anoj de nia afero zorgos, ke la instruado bone funkcios.

Graf

El la grupoj

Hannover:

Migranta ekspozicio en la distrikto Hannover.

Per la helpo de la kolegoj Beitz, Biernath kaj Heimlich oni aranĝis migrantan ekspozicion. Ĝi ekzistas el aŭgusto, fiksitaj sur latoj, paperajoj kaj nebinditaj esperantaj gazetoj, libroj kaj prospektoj. Diversaj aŭgustoj kaj paperajoj traktas pri la sama temo ekz Esperantogazetaro, Esperanto ĝenerale, Esperanto kaj fervojoj, Esperanto kaj eklezio, Esperanto kaj junularo, Esperanto-Filmo-Germanujo, poŝtmarkoj el diversaj landoj, Esperantajoj kaj varbo per Esperanto.

La ekspozicio jam migras de grupo al grupo en nia distrikto. Estas planite, ĝin pligrandigi kaj plibeligi por ke ĝi povas migri tra la tuta lando.

Heimlich

Nürnberg:

Nia ĉijara Zamenhofa festo okazos kune kun la Esperanto-Grupo Nürnberg kaj la Esperanto-Grupo Fürth sabaton

la 19an de decembro en la festalonego de la „Verkehrsmuseum Nürnberg“. Festparolos s-ro Walther Walther, Burglengelfeld.

Bonvolu jam nun noti la tagon!

Krome ni havas nun novan hejmon en „Stadtmauerturm, Frauentormauer 25“. Ni kunvenas regule nur merkrede je la 20a horo en intervaloj de 14 tagoj. La kunvenoj estos anoncataj en la Nürnbergaj ĵurnaloj aŭ marde aŭ merkrede.

Feilner

Wuppertal:

Esperanto-varbekspozicio en Opladen.

Je la 11a de oktobro ni aranĝis en Opladen publikan ekspozicion. Komunaj intertraktoj kun Revelo ebligis en Opladen ĉi tiun komunan efikan aranĝaĵon.

La dutaga kunveno komenciĝis sabate la 10an de oktobro en hotelo „Zur

Gajajn festotagojn je Kristnasko kaj Feliĉan Novjaron deziras

la GEFA-estraro



Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu- kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto. Sendimlo pro manuskripto: 15. I., III., V., VIII., X. Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn